M 1 E P. Gottgetreu, Herrenstr. 12



7-a JARO, N-o 325 LEIPZIG, 25. / 12. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbera, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

SENLABORA – AĈETU POMOJN!

BILDO EL NOV-JORKO

BEN ODINOV (13268)

Grandaj, ruĝaj, suĉplenaj pomoj disvendataj sur la ĉef-stratoj. En la financa, teatra k fabrikaj distriktoj. Ĉie, kie homoj preterpasas multnombre. La vendantoj estas senlaboruloj — 3000 da ili. Jam de 4 semajnoj la mizeruloj staras malantaŭ kestoj plenaj je pomoj k ŝirmas sin kontraŭ la vento per la afiŝoj — "Senlabora — Aĉetu Pomojn"! Malriĉuloj aĉetas pomojn pro simpatio. Riĉuloj rigardas al alia flanko. Sed kial ne bananojn aŭ oranĝojn? Ĉar tro multe da pomoj estas rikoltitaj, sed ne formanĝitaj. Iu geniulo elpensis la brilan ideon — helpi la senlaborulojn. La altruismaj komercistoj deklaris, ke ili malgajnis $ 1800 dum unu semajno. Tamen, depost kiam la merkato estas kreita, la prezo saltis supren k la profito por la popecvendistoj duoniĝis.

Kvin junuloj estas arestitaj, ĉar ili kolportis pomojn sen vend-permesoj. Vend-permesoj por diversaj varoj estas inter la rimedoj de la politikistoj registaraj por rekompenci siajn subtenantojn per kreado de nebezonataj oficoj. Magistratano Gotlib *(Gottlieb)* liberigis ilin, deklarante, ke, dum la krizo daŭras, li ne atentas la regulon pri kolport-permeso. Multsignife, — tiu magistratano estas unu el la tri ankoraŭ ne akuzataj pro aĉeto de siaj postenoj aŭ kunligo kun la banditaro.

La urbestro elektis komitaton por kontroli la disdonon de manĝaĵoj k vestoj donacitaj de bonkoraj riĉuloj. Kajo k domaĉo estas transformitaj en dormejojn. Nek la manĝaĵo nek la litoj sufiĉas. La policistoj kalkulas, ke almenaŭ 32 000 familioj mortmalsatas, sed la pakaĵoj el terpomoj, bulboj k makaronio sufiĉas nur por 15 000. 88 viroj estas dungataj por helpi ĉe la magazenoj. Du el ili senkonsciiĝis pro malsato. Dujara infano mortis pro malsato. Tre ofte patro mortigas sin k sian tutan familion. Kiam kelkmil senlaboruloj manifestaciis apud la kunvenejo de la urba parlamento, la urbestro ŝerce demandis "Kiam oni disdonos la glaciaĵon?"

Urbestro Ŭalkr *(Walker)* estas bonega kliento ĉe la boksist-konkursoj, — noktokluboj k "spikizi" *(speakeasy)*. Noktoklubo estas kafejo, kiun oni vizitas post la teatro. Duonnudaj dancistinoj k fimuziko amuzas la ĉeestantojn. Dume oni drinkas ebriigaĵojn. Spikizi (signifas: parolu mallaŭte) estas vendejo de la malpermesita alkoholaĵo. Ambaŭ funkcias senĝene, se oni pagas subaĉet-monon al la lokaj banditoj k polic-oficistoj (ofte la samaj homoj), k al la federaj "prohibici"-agentoj[1]. Okaze eltroviĝas, ke prohibicia agento posedas *spikizi,* kie li forvendas la konfiskitan viskion.

Alia rimedo por kontraŭbatali senlaborecon estas la avizo "Aĉetu nun!" Sur montrofenestroj de vendejoj, en ĵurnaloj, eĉ sur parolantaj novaĵ-filmoj la magia formulo aperas. Elspezu monon, aĉetu varon, konsumu la troproduktaĵon. Nun ne estas la tempo por ŝpari! Via patrio bezonas vian helpon! Kion aĉeti? Ĉion! Per kio? Mi estas senmona. Mensogulo! Laŭ bankdepon-statistikoj ĉiu usonano posedas pli ol 900 dolarojn. Ne estu perfidulo! Aĉetu alian zonon, alian ĉapelon! Helpu malfermi la fabrikojn. Jen la falsaj argumentoj ĉie aŭdataj.

La prezidanto Huvr *(Hoover)* konsilas al la kapitalistoj fari ĉiun laboron estonte bezonatan. La "Ĉiutaga Novaĵo" *("Daily News"* — la plej disvastigata ĵurnalo en Usono) tre fervore aprobas la konsilon, sed kriegas, ke tio nur tuŝas la problemon. En ĉefartikolo ĝi akuzas Huvr pri krima pacifismo pro lia kvakera edukado. (Huvr estas membro de la pacifista protestanta sekto "kvakeroj", alinomata "Societo el Amikoj".) Ĝi postulas la tujan konstruadon de la kirasŝipoj permesataj de la Londona "Senarmig"-Konferenco. Ĝi argumentas, ke la plej riĉa lando en la mondo bezonas la plej grandan milit-ŝiparon por defendi sin kontraŭ la ĵaluzaj eŭropanoj. La Hojrst *(Hearst)* ĵurnaloj, la plej aĉaj, "flavaj" skandalkreantoj, eĥas la samon k eĉ superas ĝin laŭ ŝovinismo.

La federa (tutusona) parlamento elektis komisionon por helpi al la farmistoj. Je ĝia dispono estas $ 500 000 000 (duon-miliardo) por subvencii la farmistojn per pruntoj k por ekvilibrigi la merkaton per aĉeto de troaj farmproduktoj[1]. En Kalifornio (okcidenta distrikto) estas fondita korporacio por ekspluati la vinber-industrion. Ĝi disvendas densigitan vinbersukon. La aĉetanto aldonas akvon k lasas ĝin malkovrita dum kelkaj semajnoj. La rezulto estas — vino. La plej supera juĝejo deklaris, ke la vendo de fermentema vinbersuko ne konfliktas kun la alkoholmalpermes-leĝo. La farmhelp-komisiono pruntedonis al la korporacio $ 16 000 000. Ĝia advokato ĉe la kunsido de la komisiono estis Mejbl Ŭakr Ŭildebrand *(Mabel Walker Wildebrandt)*. Antaŭe ŝi estis ĉefo ĉe la "prohibicio"-agentoj.

La sukceso de la entrepreno tamen estas duba. La direktoro jam plendas, ke ne plu estas profito en la orientaj urboj pro la minacpostuloj de la banditoj. El Ŝikago *(Chicago,* nord-centra metropolo. Loĝantaro 4 milionoj) venas ultimato de "cikatro-vizaĝa"

---

[1] Prohibicio = alkoholmalpermeso leĝo. — *Red.*

[1] Tiu komisiono ĵus aĉetis jam 100 milionojn da buŝeloj da tritiko.

Al(berto) Kaponi *(Scar face Al Capone)*. Li avertas la kompanion ne disvendi la vinbersukon en Ŝikago, kiu estas lia privata kampo por bier- k viski-negoco. (Li vendas nur pogrande.) Ĉiuj konkurencaj banditoj estas murditaj. La preferataj armiloj estas maŝinpafiloj, k bomboj nomataj "ananasoj". Nur malsaĝuloj aŭ troriskemuloj kuraĝas kontraŭstari la plej potencan banditĉefon. Lia arogo estas miriga. Per sendito li sciigis al la juĝisto, kiu prezidas ĉe la krim-enketkomisiono, ke li likvidus ĉiujn siajn krimajn entrepenojn, se la registaro rekompence ne ĝenus lin ĉe lia alkoholaĵ-komerco.

En Nov-Jorko la banditoj estas same potencaj. En la "Telegramo", je 12-a de novembro aperis artikolo sub la titolo "89 pafitaj, el kiuj 35 mortis, dum unu monato; banditoj akuzitaj pri 30 estis liberigataj". Tio instigis la publikan procesanton Krejn *(Crain)* anonci jenon: "Mi neniam vidis pli efikan prezentadon de tragedia situacio. Ĝi devas veki k certe vekos la leĝobeantojn al tuja k efika aktiveco. La nuna situacio estas netolerebla. Ĝi postulas unuigitan agadon. La 20-an de novembro mi vokos al mia oficejo 50 reprezentajn civitanojn, inter ili la ĉefojn de la metioj k industrioj viktimigataj de banditoj. Mi invitos la publikajn procesantojn de (sekvas nomoj de la 4 aliaj urbopartoj). Mi submetas la faktojn al ili k petos ilian kooperadon en la lukto por liberigi Nov-Jorkon de banditoj."

Plej lastdate gazetoj anoncas, ke armitaj rabistoj en antaŭurbo de Nov-Jorko malplenigis la poŝojn de du kontraŭkrim-gardistoj k rifuĝis en aŭtomobilo; ke Ĵak Guzik, "salajro-paganto" de "cikatro-vizaĝa" Al Kaponi estas kondamnita de l' federa juĝistaro pro evito pagi pli ol 500 mil dolarojn da enspez-imposto. (Se li estus paginta la enspez-imposton, la registaro profitus pro liaj krimaj entreprenoj.)

En la plej riĉa lando en la mondo homoj mortmalsatas, ĉar tro multo da varoj estis produktataj. Farmistoj bankrotas, ĉar tro abunde kreskis la tritiko. Virinoj anstataŭas virojn ĉe la maŝinoj. Infanoj anstataŭas la virinojn. Kaj ĉie la banditoj. Estas malpermesate posedi revolveron sen permeso, sed la fabrikantoj rajtas *forvendi* ilin. La registaro tre atentas por ne malhelpi negocon.


En la plej granda urbego de la plej riĉa lando, Nov-Jorko (loĝantaro 7 milionoj), estas permesata vendi pomojn. Oni detruas deketaĝan domon k anstataŭigas ĝin per dudeketaĝa. Oni detruas la 20-etaĝan k anstataŭigas ĝin per 40-etaĝa. 100 000 aŭtomobiloj sur la stratoj disputas la irrajton kun sennombraj ŝarĝaŭtoj, aŭtobusoj k tramoj. Super la stratoj levitaj fervojoj. Sub la stratoj subter-fervojoj. Ofte du — unu sub la alia. Ĉe Tajms Skŭer *(Times-Square* — centro de la teatra distrikto) 4 relvojoj preterpasas unu sub la alia. Pli ol duono de la vestoj portataj en Usono estas fabrikataj ĉi tie. Kaj la banditoj regas ĉie. Apotekisto aŭ cigarvendisto ankoraŭ ne prirabita estas konsiderata kiel kuriozaĵo. Laŭ famo la bandit-ĉefo Rotstin *(Rothstein* — murdita antaŭ 2 jaroj) fordungis banditojn al strikantoj k strik-rompantoj po 10 dolaroj tage. Kvaronon el tiu sumo li mem enpoŝigis.

En la plej granda urbego de la plej riĉa lando la urbestro petas la luigantojn ne elĵeti en la stratojn la senlaborulojn. Estas permesate vendi pomojn.

FREDERIKO ENGELS

(LUCIO LORA)

Hodiaŭ la laborista movado memoras — aŭ pli vere "devus" memori — pri la cent-deka datreveno de l' naskiĝo de Frederiko Engels. La moderna laborista movado ekzistas depost proksimume jarcento, k al ni ne mankas en la nuna tempo mult-



nombraj datrevenoj, kiuj signas la trapasitan vojon. Sed la plimulto el la nomoj, per kiuj nia gazetaro honoras de tempo al tempo la memoron, apartenas definitive al la pasinto. Inter la maloftaj esceptoj, inter tiuj, kies verko transvivis ilian morton, necesas citi Frederikon Engels, la amikon k kunlaboranton de Karlo Marks.

Oni ne asertas tro, dirante, ke sen Engels, Marks mem ne estus povinta doni al la internacia socialismo la nekompareblan konstruon de sia doktrino, kiu rezistis depost duonjarcento al ĉiuj kritikoj, al ĉiuj atakoj, al ĉiuj provoj de revizio.

Por ne perdi sian personecon, por ne malaperi kiel malatentinda iomo flanke de la giganto, kiu estis Marks, Engels devis mem posedi eksterordinarajn kvalitojn. Ne prokrastu ni laŭdi la sindoneman amikon, la kunlaboranton pretan oferi sian liberan k sian labortempon, por doni al Marks la eblon daŭrigi siajn studojn. Tiurilate Engels pruvis abnegacion nesuperitan en la kroniko de l' revolucia historio.

Kion oni emas ofte forsilenti, tio estas la persona parto, kiun Frederiko Engels liveris al la marksista doktrino. Se vere li estus nur la amiko rezignanta pri sia persona laboro por permesi al Marks skribi la "Kapitalo"-n, li havus rajton al la dankemo de l' internacia proletaro sammerite kiel ĉiuj, kiuj sennome oferis sian vivon sur la barikadoj de Parizo en 1871, de Moskvo k Sankta Peterburgo en 1905, de Petrogrado en 1917.

Tamen, Engels estis la kunlaboranto de Marks en la plej kompleta k plej alta senco de tiu termino. La dua k la tria libroj de l' "Kapitalo", el kiuj Marks lasis nur skizojn, estis ellaborataj k *kompletigataj* de Engels post la morto de lia amiko. Oni povas prave demandi sin, kio estus fariĝinta el tiuj du volumoj sen Frederiko Engels.

Tiuj, kiuj diligente penas relegi kun atento la duan k trian librojn de la "Kapitalo", povas konvinkiĝi sen malfacilo, ke ĉi tiuj du libroj neniam estus aperintaj sen la *pozitiva* k *sendependa* laboro de Engels. Sennombraj notoj atestas pri la penado farita de la kunaŭtoro de l' "Komunista Manifesto" kun celo evoluigi la penson de Marks.

Oni trovas en la "Kapitalo" k en aliaj verkoj de Engels multnombrajn pecojn, kiuj elmontras, ĝis kia punkto ĉi tiu vidis ĝuste en siaj antaŭvidoj pri la estonto de l' kapitalismo. Tiuj pecoj, datiĝantaj de la epoko tuj sekvinta al la morto de Marks (1883), montras, ke la nuntempa kapitalisma krizo konfirmas komplete la antaŭvidojn de l' marksisma doktrino.

En sia antaŭparolo al la "Mizero de l' Filozofio", de Marks, Engels diras pri la cikloj de krizoj de la moderna kapitalismo:

"Depost kiam Anglio perdas pli k pli la monopolon super la mondmerkato sekve de la partopreno de Francio, Germanio k precipe Usono en la internacia komerco, nova formo de ekvilibrado ŝajnas voli stariĝi. *La periodo de ĝenerala prosperado, kiu antaŭiras la krizojn, ne ĉiam videbliĝos; k se ĝi forestus, daŭra stagnado, kun negravaj variadoj, fariĝus la normala stato de l' moderna industrio*[1]."

Engels esprimis opinion identan en

[1] "Mizero de l' Filozofio", antaŭparolo, pĝ. XXIV (1884).

siaj komentoj al la "Kapitalo"[1] k en siaj leteroj al s-ino Viŝnevecki, angla aŭ pli ĝuste usona, tradukintino, de kelkaj el liaj verkoj. Oni trovas tie originalajn ideojn pri la protektismo, la monopoloj, la akci-societoj, vizion profetan pri la nuntempa agrar-krizo k ĝiaj kaŭzoj. Parolante pri vastaj senkulturaj etendaĵoj en Usono, Kanado, Argentino ktp., Engels skribas: "*Feliĉe ĉiuj stepoj ankoraŭ ne estas kulturitaj; restas ankoraŭ sufiĉe por ruinigi la tutan grandan bienposedantaron de Eŭropo k la malgrandan super la merkato*[2]."

Kompreneble, oni ne devas atendi trovi pri ĉiuj tiuj demandoj kompletajn k sinsekvajn raportojn. Tro skrupula por transiri la kadron, kiun Marks mem estis difininta al sia giganta verko, Engels limigis sin kompletigi ĝin aldonante k intermetante iujn liniojn, kiujn Marks ne plu havis la tempon ellabori.

Sed precize pro sia ofte fragmenteca karaktero, la dua k tria libroj de l' "Kapitalo", kies publikigon oni ŝuldas al Engels, prezentas al la leganto intelektan ĝuon multe pli superan al tiu, kiun donas la legado de l' unua libro. Oni tie renkontas, en ĉiu ĉapitro, amason da problemoj, rimarkoj naskantaj tian aŭ alian demandon k liverantaj nur komencan, nekomplete disvolvitan, sed tamen per la realo de nia tempo konfirmitan solvon.

La plej bona omaĝo, kiun la juna socialista generacio povas doni hodiaŭ al Frederiko Engels, estas serioze ekstudi la trezorojn, kiujn li postlasis al ni en la "Kapitalo" k alie, k el kiuj granda parto ne ankoraŭ estas utiligita por la proleta batalo.

[1] "Kapitalo", libro III, 1-a k 2-a partoj.
[2] "Kapitalo", libro III/2 (parto pri grunda rento).

Kristnaska festo por proletoj

Ho, kiam en vintro blovegas la vent',
De l' turo sonoras tra l' nokta silent' —
Samtempe infanoj sen pano, sen vest'
Malsatas, frosttremas dum sankta kristfest'.

Infanoj preĝadas al dia infan',
Kredante al helpo el tiu ĉi man';
Jen peto de ili en granda mizer':
Nur panon k karbojn dum sankta vesper'!

Amase etulojn forprenis la mort',
Ĉar mankis nutraĵo — laŭ dia mondord'.
Malmultaj profitas, diboĉas sur ter', —
Plejmulto suferas — dum sankta vesper'.

Laŭ la germana melodio: "Ihr Kinderlein kommet . . ."

Germ. teksto de R. Schulz, Frintrop.
Esp-igis Kastelano (601).

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en "S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

POR NI MEM

(Kvazaŭ respondo)

Jam kelkfoje sovetaj K-doj estis kulpigataj pro la fakto, ke ili, priskribante siajn sukcesojn en la mastrumfronto, preskaŭ nenion skribas pri si mem, pri vivantaj homoj. Kial do?

Tiu fakto ne estu stranga por ekstersovetiaj laboristoj. Ja nun ĉie, krom en USSR, gelaboristoj kun "ne tre ĝojaj" okuloj observas la mastrumdisvolviĝon de l' fabriko de sia dunganto. Ĉiu plibonigo, raciigo — signifas, ke aperos novaj centoj da miloj da senlaboruloj. Mastruma progreso de l' kapitalismo nenion donas al la laboristaro, krom pliakriĝo de l' interrilatoj inter kapitalisto k laboristoj, krom pligrandiĝo de la nombro de mizeruloj. Nome tial nesoveta laboristo diras k skribas pri "sia" fabriko kun malamo, tute silentante, en pli bona okazo. Li ne volas paroli pri ĝi, ĉar ĝi elsuĉas el li la lastajn fortojn, sanon, donante, anstataŭe, malmultnombrajn moneretojn k plenan malsanon. Male estas en USSR.

Ĉiu nova fabriko, manufakturo, elektrostacio, granda vilaĝ-mastruma kolektivo — ĉio estas niaj venkoj. Se ekstersovetiaj amikoj vidus, kun kia grandega amo nia laboristo karesas per mano ŝtalan korpon de maŝino, prizorgas ĝin! Ĝi estas *lia* maŝino, *lia* propraĵo, k li per sia brusto defendos ĝin. Kaj nova fabriko! Kiom da entuziasmo ĝi aperigas... Ne estas priskribebla tiu grandega festo, necesas ĉeesti, vidi memstare.

Alvenintaj el eksterlando Gek-doj ofte diris mirigite: "Ĉe ni oni ne kredus, se ni rakontus, kiel fieraj vi estas, konstruante fabrikon." Ja estas vero, ke niaj laboristoj unue invitas alvenintan laboriston eksterlandan viziti ilian fabrikon.

— Jen, K-do, *nia* fabriko... Vi komprenu, karulo, ja ĝi — *nia* estas!

Niaj ĵurnaloj sur la unua paĝo presigas mastrum-informojn k nur poste — "ceteraĵon". Jen kial ni pli multe skribas pri maŝinoj ol pri ni mem. Ja *nia* fabriko estas nia *vivo, ni mem*.

Vi, ekstersovetiaj geamikoj, legante pri niaj sukcesoj, forgesas ĉefaĵon: Ni, gelaboristoj sovetiaj, konstruantaj socialismon, staras malantaŭ niaj atingaĵoj, ni estas videblaj en ĉiu desegnaĵo de l' fabriko novkonstruita. Ĉiu nova ekonomia venko estas nova paŝo al radiluma estonto, nova paŝo sur la vojo de l' plibonigo de niaj vivkondiĉoj. Sed de la batalo, de l' laboro ni estas nedivideblaj, ni kunkreskis kun ĝi. Ni estas fabrikoj, laborejoj k fabrikoj, laborejoj estas — ni!

Tial kun fiero k amo priskribante niajn atingojn, ni priskribas nin mem. Ĉu kresko de salajro ne karakterizas nin? Ĉu priskribo de klubaj rondetoj, laboroj en lernejoj ktp. ne donas ion al gelaboristoj tutmondaj? Sed skribi pri tio, ĉu nia laboristo ŝanĝas kolumon aŭ ne, k kiom da fojoj tage — ĉu tio necesas? Ĉu indas tio?

Stefano Baĵanov (10 386).

Ĉe la sojlo de 1931 —

restu aktivaj membroj de SAT!

Pensu pri la gravaj taskoj de forta esp. laborista movado!
Helpu fortigi nian gazeton!
Varbu konstante inter la vicoj de l' esperantistaj proletoj!

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

El Norvegio

La balotoj de l' 20. oktobro unuafoje rezultigis malvenkon por la "laborista partio", kiu depost sia naskiĝo en 1897 regule progresadis. Kvankam ĝi restis la plej forta partio (367 mil elektantoj k 47 deputitoj), ĝi perdis 10 mil voĉojn en la urboj (ankaŭ la plimulton, kiun ĝi havis en Oslo) k tenas sian nombron nur per ekvivalentaj gajnoj en la kamparo. La komunistoj perdis pli ol 20 mil voĉojn el 39 mil en 1927 k havas neniun elektiton. La malvenko de l' lab. partio estas atribuata al la fakto, ke la revolucia alo en la partio havas la superecon k la publiko ne plu sciis distingi tiun partion de la oficiala komunista. Ĝia unua fiasko estis la ministerio Hornsrud (komence de 1928), kiu formita el 9 ministroj, inter ili 7 malkaŝaj revoluciuloj, anoncis publike sian intencon enkonduki en Norvegio novan socialistan sociordon. Ĝi estis renversata post malmultaj tagoj da regado de reakcia plimulto (kiun subtenis la maldekstra burĝa partio). La burĝoj uzis dum la balot-agitado ĉiujn usonajn reklam-metodojn, standardojn, transstratajn banderolojn, flaget-

Unu el la interesegaj popular-sciencaj broŝuroj eldonitaj de SAT-Kooperativo estas

SEKSPSIKOLOGIO

Originale verkita de S. ZIEGLER.
Serioza traktaĵo bazita sur la esploroj de la moderna psikoanalizo. 54 pĝ. Form. 11×14 cm. Prezo 0,60 mk. g.
Administrejo de SAT, Colmstr. 1
Leipzig O 27.

ojn k balonetojn, aŭtomobilojn ornamitajn, eĉ aviadilon kun grandliteraj devizoj: "Voĉdonu kontraŭ Rusio!" "Ĉiu nebalotanto estas dizertulo de l' fronto k burĝa devo." Tiuj alvokoj evidente efikis sur la publikon. Unu dekstra ĵurnalo enregistris dum 48 horoj 1717 novajn abonantojn, k la elcento da elektantoj transpasis en la ĉefurbo 85%, atingis en kelkaj kamparaj distriktoj eĉ 100%. La emancipiĝo de l' proletaro ne iras rektvoje...

J. S.

El Finlando

Ĉi tie furiozas la faŝista "Lappo"-movado. Mia edzino, mi k kelkaj aliaj geinstruistoj estas eksigitaj el niaj postenoj pro nia pacifisma ideologio. Oni taksas nin kiel "amikojn de Sovetio" k tio estas sufiĉa kaŭzo por perdi la oficon. Eĉ sovetia greno estas persekutata en nia mizera k malriĉa lando, kvankam ĝi estas tiel malkara k bona, ke ĝi devus taŭgi al ĉiuj. Laŭ "Lappo"-faŝista maniero oni forveturigas kontraŭvole la arestitojn en aliajn lokojn per aŭtomobilo, i. a. tiaj viktimoj estas K-do Avinen en Lohiluoma. Multaj el niaj K-doj estas en malliberejoj. La farso de l' "Ligo de Nacioj" estas finota per la volo de l' laborista klaso, kiu sola deziras k povas alkonduki veran pacon.

A. R. (7281).

Ondo de arestoj en Italio

La persekutoj k arestoj sinsekvas senĉese: en Torino, Napolo, Milano. Pizo, Venecio, Livorno, Padovo, Romo, en Sicilio, ĉie. Ne estas eble doni la nomojn de l' arestitoj, ĉar la polico absolute silentas. Certe inter la arestitoj estas granda nombro da advokatoj, inĝenieroj, profesoroj k eĉ ŝtatoficistoj. La agoj estas direktataj de la direktoro de l' politika polico en Romo, interkonsente kun la registara ĉefo. La registaro k faŝista partio intencas trafi ĉiujn, kiuj estas suspektataj, ke ili esprimis malfavorajn juĝojn pri la reĝimo sekve de konstato pri la gravo de l' financa k ekonomia krizo, krome tiujn, kiuj apartenas al kontraŭfaŝista movado "Justo k Libero", distribuis aŭ simple vidis la kaŝajn ĵurnalojn k flugfoliojn de tiu movado. Oni jam nombras centojn da arestitoj.

Laŭ "Italia".

Laborista Internaciismo — Laborista Sennaciismo

Dum ekzistas nacilingvoj, — ekzistas nacioj, naciismoj, internaciismo. Nun estas tia situacio, sekve la termino internaciismo ĉe nacilingvoj sen konsidero pri komuna lingvo estas trafa. Al tio la proletaro adaptis sian batalon kontraŭ la burĝaro.

Tamen estas diferenco inter la internaciismaj tendencoj (laŭ nacilingva senco). Kiu rigardas la naciecon kiel daŭran fenomenon, tiu estas internaciisma laŭfakte. Formiĝas lia sinteno al la nacia ŝtato tiel, ke iam li oferas la ĉefaĵon, la socialismon, por la akcesoraĵo, la nacieco (jaro 1914 ktp.). Sed de ĉiuj estas konsentite, ke la materiaj aferoj estas la plej gravaj, fakte direktantaj en la socio. Ju pli laŭracie oni vivas, des pli solvendaj ili aperas. La solvo pri la materiaj aferoj estas la ĉeftasko de socialismo, kiu ja naskiĝis el la materia mizero. Tial tiuj, kiuj oferis socialismon pro naciemo, ne estas fidindaj socialistoj, tiaspecaj gvidantoj ĉiam havas en si danĝeron por la proletaro.

Por unuiĝi necesas interkompreniĝi, skribis K-do Lanti; tial la agnosko k enkonduko de esperanto fare de l' laboristaj partioj donas la kondiĉon por unuiĝo. Sed tia unuiĝo, unuiĝo pere de esperanto en sia pli alta grado, estus unuiĝo sennacieca, ĉar esperanto malgravigus nacilingvojn k per tio naciismon. Ĉiu venko de esperanto estas kvazaŭ bato kontraŭ la naciismo. La plena venko de esperanto profetus pereon al nacilingvoj, kio estus nur demando de tempo. Ili fariĝus iom post iom ne bezonataj. Tiam ekestus unu, la esperantista nacio, pli bone, — estus neniu nacio. Senklasa k sennacia socio estas la fincelo de la klasbatalantoj.

Kiu tendenco rigardas la naciecon nur kiel aktualan fakton, sed konsentas pri ties pereo aŭ eĉ akcelas ĝin, tiu ne estas plu internaciisma, sed pli malpli sennaciisma. Estus tendenco,

---

Vojaĝimpresoj de K-do Perer[1]

(1. daŭrigo. Vidu antaŭan n-on)

De Moskvo al Kazano la vojoj estis pli malpli vetureblaj. Mi spertis brulegon de rusa somera suno, konatiĝis ankaŭ kun kuloj. Mi ja baldaŭ atingis la "tajgon" (praarbaron). Maldense surloĝatajn regionojn de Siberio mi atingis; la vojaj malfaciloj pligrandiĝis. Feliĉe la lando estas la plej paca, la loĝantaro la plej gastema, kiun iam ajn mi renkontis. La Kazanaj K-doj nun helpis al mi efektivigi mian projekton konstrui aparaton, kiu permesus al mi bicikli *sur la fervojaj reloj*. Ja arestis min la fervoja polico, sed, mirigite pri la invento, post kontrolo al miaj dokumentoj liberigis min, donante permeson uzi la fervojan linion. Ĉefe Gek-doj Anonimov k Vera Kiselova meritas publikan dankon pro ilia zorgema helpo.

Komence de julio 1929 mi forlasis Kazanon, unuafoje sur reloj de fervojo k tute senmona spite la granda helpo de l' esp-istaro. Mi veturis tiel 70 km surrele. La morala sukceso estis grandega. Bedaŭrinde la materiala ne tiom. En stacio Orsk mi frakasas ĉion, biciklon k aparaton, pro neperfekto de ĉi lasta sur difektita relo. Piede mi devas daŭrigi la vojaĝon, vagante kiel sovaĝulo tra arbaroj. Vendante iom post iom miajn fotojn, mi gajnas tamen sufiĉe da mono por ripareti la biciklon k atingas fine Omskon, spite ĉiuj malfaciloj.

Tie K-do Kulakov (esp-isto, eksmekanikisto, nun instruisto) proponas sin helpi por rekonstrui mian maŝinon. 4 tagojn daŭras la konstruado de nova maŝino k eksperimentado kun la aparato, laboro farita kun tiu entuziasmo, kiu nuntempe karakterizas sovetianojn, malgraŭ egaj malfaciloj. Denove mi ricevis permeson utiligi la relvojon por mia servo.

Estas aŭgusto 1928. Aplaŭdite de la sportuloj, esp-istoj k scivolemuloj mi forlasas la urbon; unu semajnon poste mi estas en Novosibirsk, je fino de septembro en Irkutsk, je komenco de oktobro en Ĉita. En tiu sezono Transbajkalio k la Bajkallagaj ĉirkaŭaĵoj prezentas mirinde pentrindajn pejzaĝojn. Unuaj frostoj k neĝo min trafas la lastajn tagojn de l' veturado. Mi ne plu povas daŭrigi. En tiu ĉi epoko la konflikto ĉino-sovetia pliakriĝis. La soveta potenco reirigis min; spite la klopodoj de l' Ĉita-a esp-istaro, oni resendas min al Irkutsk.

Tie mi travintras, dank' al helpo de l' loka K-daro esp-ista, kiu havigas al mi laboron k loĝejon. Neforgeseblajn monatojn mi travivas. Mi vivas en vicoj de tiuj kuraĝaj, konsciaj, bravaj popolamasoj sovetiaj. Eĉ 45° da frosto ne timigas min. Iom post iom mi eklernas la rusan lingvon. Tiom pli intime mi vivas sovete.

Baldaŭ la milita konflikto finiĝas; pritempo revenas. Kun la belaj majaj tagoj mi reekveturas. Denove reloj estas por mi la planksavilo. 15-an de majo mi estas en Ĉita, 20-an mi forlasas ĝin. Semajnon poste mi jam estas en Manĉurio. 5 tagojn mi loĝas en Ĥarbin. La 11-an de julio mi atingas Vladivostokon. Ve! en Manĉurio mi vidis apud landlimoj malĝojigajn postrestaĵojn de l' konflikto. Jam en 1927, mi rakontis en "S-ulo" pri vidaĵoj el Verdunaj batalkampoj. Preskaŭ la saman bildon mi ekvidis ĉi tie. Kaj plej indignige, ke ĉiujn detruojn faris la ĉinoj mem, dezertigante tiel regionojn okupendajn por sovetoj. Tion atestis ĉiuj personoj, kiujn mi renkontis. (Fino de l' enkonduko.)

(Daŭrigota.)

[1] France: Peraire.

kiu gardus la ĉefaĵon, la socialismon, por ke ĝin ne superu la naciismo, forigendaĵo. Estus tendenco, kiu ne aprobus la "pli altajn" naci-kapitalist-ŝtatajn interesojn, sed nur interesojn de la proleta klaso, sen konsideroj pri nacieco. Ĝi estus do kontraŭŝtata, patriperfida.

La difinoj pri internaciismo k sennaciismo en "Plena Vortaro" estas ĝeneralsencaj. Estas miaopinie manko, ke oni ne metis tie proletklasajn difinojn, ekz. sub 2. Estas internaciuloj-burĝoj k internaciuloj-laboristoj, sennaciuloj-burĝoj (en "S-ulo" oni legis pri sennacieca trusto, sekve estas tie sennaciuloj) k sennaciuloj-laboristoj. Precipe, ĉar laborista sennaciismo estas tiom proksima al SAT, ne estis bone malatenti tion. Oni ne komprenu tiujn ĉi vortojn kiel riproĉon, sed kiel klopodon por precizigi, plibonigi. Mi deziras legi opinion de SAT-anoj en "S-ulo" pri tio. Ni ja ne povas k ne devas malatenti klasbatalon kiel iuj K-doj pretekstas diradi. Ni devas ĉiam akcenti, ke la klasbatalo estas la ĉefaĵo, sed por klare difini la celon, oni devas adopti sennaciecan mondkoncepton, rezigni je nacieco. Ni transformadu la spiritojn, la rezultoj en la reala, politik-ekonomia vivo sin montros mem. Nia sennaciismo ne povas esti por ni nur afero de nacieco. Cetere K-do Lanti nemalofte diris, ke li neniam volis fortiri la sennaciismon de l' klasbatalo. Tio pruvas, ke estas "laborista sennaciismo", kiu bezonas esti klare difinita. Ankaŭ por la "laborista internaciismo" estas necesa klara difino.

SAT-ano 5194, Ĉeĥoslovakio.

POR AŬ KONTRAŬ SOVETIO?

Jam pasis 12 jaroj, de kiam la kapitalistoj ĉesis komerci per milito en Eŭropo k dum kiuj ili stokis militmaterialon por nova atako. Mi nomas ĝin atako, ĉar "defendo" ja ne povas esti. Sed kontraŭ kiu ili atakos? Ĉu kontraŭ la faŝismo? Ĉu kontraŭ la reakcio? Ĉu kontraŭ la bolŝevismo? Oni ne scias precize, eble diros naivaj homoj.

Oni ne plu rajtas dubi pri la celo de l' nova milito, mi asertas! Ĉar en la kapitalista gazetaro oni povas preskaŭ ĉiutage legi longajn artikolojn pri "la danĝero de la bolŝevika progreso". Jen la sola malamiko, kontraŭ kiu sin armas la kapitalistaj "paradizoj". Ĉiutage la burĝaj ĵurnalistoj raportas pri la intensa disvolviĝo de la bolŝevika industrio k perfektiĝo de l' teknikoj, ne nur industria, sed ankaŭ kooperativa k agronoma. Ili atentigas, ke tia progreso estas la sola minaco al la paco k cinike ekscitas la laboristaron kontraŭ Sovetio, argumentante, ke ju pli Sovetio progresos, des malpli ili manĝos pro krizoj en la diversaj labor-branĉoj. Tiel fie mistifikante estas facile trovi amasojn da laboristoj pretaj por "defendi sian panon" kontraŭ Sovetio.

Al kiu do trudiĝas la devo propagandi la "veran celon" de l' bolŝevika progreso? Certe al la komunistoj. Sed por tio necesas, ke la komunistoj estu unuanimaj. Necesas, ke ili estu pretaj por transformi la militon en proletan revolucion, unu fojon por ĉiam, kiel diris dana K-do (11 082) en "S-ulo" n-o 317. Morgaŭ eksplodos milito. La kapitalistaj registaroj mobilizos la homojn, k la komunistoj ne estos ŝparataj. Ĉu ĉi lastaj rifuzos aŭ pretos militi? Se ili rifuzas, ili riskos persekuton. Se ili pretos militi, ili devas havi celon. Kaj en tia okazo ekzistas nur du celoj: defendi la patrion aŭ propagandi la ribelon. Defendante la patrion vi ĉesas esti komunisto. Propagandante la ribelon vi celas la sukceson de Kominterno. Nu, se vi estos pretaj por ties sukceso en milita tempo,



kial vi ne estas en paca? La kom. partioj estas dividitaj en tri partojn: centro, dekstro k maldekstro. Tia divido estas rezulto de faktoroj, kiuj plej ofte ne estas konataj de la amasoj. La gvidantoj de tiuj malsamaj taktikoj alvokas la amasojn al la kom. partio. Ĉi lastaj aliĝas bonintence, sed baldaŭ estas kritikataj de alia flanko. Ili scias neniam pri la vero, pri tio, kio okazigas tiom da polemikoj inter la komunistoj k rezulte de tio la amasoj malkuraĝiĝas je malprofito de la komun ista movado. Kiaj estas do tiuj faktoroj, kiuj disigas la movadon?

Objektive estas al mi neeble preciz igi, sed se oni esploras la interesojn de la diversaj gvidantoj, oni trovas personajn profitojn, kiuj malaperus en okazo de unueco. Kiam mi aŭdas paroli pri unuiĝo de la amasoj, dum interne oni preparas disiĝon, mi rememoras pri luterana pastro, kiu foje demandis al mi, ĉu mi estas protestanto aŭ katoliko. Tiam mi respondis, ke miaj gepatroj instruis al mi katolikismon k ke pri protestantismo mi scias neniom. Li kun bedaŭra nuanco penegis certigi min, ke la luterana doktrino estas la plej bona k la katolika estas aĉa, hipokrita, mensoga, ktp.

Pasis kelka tempo, k jen mi havis okazon renkonti katolikan pastron, al kiu mi faris protestantismajn observojn, k siavice li blasfemis kontraŭ la "demono, kiu penetris en mian animon" k per ĉiuj rimedoj li penis konverti min. De tiu tempo mi ĉesis kredi ĉiajn pastrojn, ĉar senpene mi konstatis, ke kiaj ajn ili estu, ilia sola celo estas paraziti. Konsekvence mi konstatas la saman celon ĉe la "disigantoj" de la kom. partioj.

Alvoki al unuiĝo, al batalo, al renverso ktp. estas "infana ludo"; sed unuiĝi, batali k renversi estas multe pli komplike k sekve estas "vira tasko". Ne gravas, se oni fiaskas kelkfoje. La ĉefa parto por la sukceso estas balai la internajn malamikojn for de niaj medioj. Ilin toleri signifas retroiri k la progreso dependas de la persistgrado. Tiel oni pli facile povos eviti ke la estonta milito iĝu komerca k longdaŭra. Ĉiam por Sovetio! *Soares.*

EL ISLANDO

(Fino. Vd. n-on 322)

El la "blankigitaj tomboj"[1] ĉe ni

Estroj de publikaj entreprenoj ricevas multajn mallaŭdajn vortojn, precipe se ili aŭdigas, ke ili fidas al la entreprenoj k al la sistemo, sur kiu ili estas bazitaj, k la feliĉo gardu ilin, se ili montras sian kredon per agoj! La alion oni ne tuŝas, ke multaj el tiuj, kiuj sin okupas pri komerco, fiŝkaptado aŭ aliaj privataj entreprenoj en Islando, legas malbone, skribas malfacile, ne kapablas kunmeti leteron sialingve, ne parolante pri lingvoj fremdaj, scias nenion pri librotenado aŭ aliaj komercaj praktikoj, k laŭ tio certe iras la tuta funkciado de iliaj entreprenoj.

Viro, kiu dum multaj jaroj estris grandan entreprenon k al kiu la banko donis krediton ĝis multcent miloj da kronoj, estis tiel lerta en komercaj scioj post sia granda sperto, ke kiam li sin turnis al alia komercbranĉo, li faris la elementan librotenadon sur domgablon[2] de sia najbaro. *Kredito* estas ĉe unu flanko de l' fenestro k *debeto* ĉe la alia. La kalkulado estas farata sub la fenestro. Tie oni povas vidi la tagprezojn multobligitaj k almenaŭ tiel ofte malkorekte kiel korekte kalkulitaj. Apud la gablo staras cindrositelo, k kiam la kontoj estas saldataj, oni prenas cindron en la manojn k frotas super la kalkulojn.

Estas ega honto ne preni la gablon

[1] Aludo al privat-entreprenoj. — *Red.*
[2] Gablo = frontona triangulo.

el la domo k ĝin konservi kiel gravan k instruan dokumenton el la komerc-historio de islandanoj. La domo estas nur duetaĝa!

Grandega entrepreno privata kun multaj direktoroj unu super la alia konstruas manufaktur-komercejon en tiu loko de la urbo, kie ĉiu stultulo povas vidi, ke neniu tia komerco estas farebla. La konstruo kostas kvaronon el miliono da kronoj k tamen estas tiel konstruita, ke ĝi ne povas forteni pluvon nek venton. Post kvar jaroj la plankoj estas tiel putraj, ke ili rompiĝas sub paŝantaj piedoj. Kaj iom poste oni vendas la domon por 30 mil kronoj aŭ kun ĉirkaŭe ducentmilkrona perdo, k estis pro speciala ŝanco, ke ĝi estis uzebla por io en loĝejmanka urbo, k tute ne antaŭ ol oni rekonstruis ĝin plejparte.

Kion oni dirus pri publika entrepreno, se ĝi agus simile al tio?

Kaj kion oni dirus pri publika entrepreno, kiu posedus preskaŭ unumiliono-kronan postulon al kliento, donus lin libera de ĉio kiel relative nesolventa, nevidante dekokmil-kronan heredaĵon, kiu al li falis en tiu ĉi sama jaro, ktp., ktp.

Aŭ la entreprenisto, kiu tiel bone zorgas pri sia propra gajno, ke li lasas landfamajn trompistojn eltrompi de si komercaĵojn valorantajn sesdekmil kronojn, sendas egale landkonatan netaŭgulon k mizerulon kun ili por gardi sian rajton. Kiam tiu vojaĝo iom longe daŭras, la entreprenisto mem ekiras, sed revenas kiel hundo en ĉeno de unu el la friponoj. Tiu ĉi lasta per unu palpebrumo nuligis la sesdekmil-kronan postulon de la entreprenisto k anstataŭe posedas postulon ĝis tridek miloj al li k minace diras, ke la entreprenisto povas esti danka por ne iri en malliberejon aldone.

Fiŝkaptista societo, preskaŭ bankrota, havas multe da fiŝo nevendita. Ĝi ricevas aĉetproponon je kontentiga prezo, se la fiŝo atingas difinitan mezuron. La societo kredas, ke la fiŝo ne atingas tian mezuron k perdas la aĉeton. La fiŝo estas tenata, ĝis ĝi estas duone nemanĝebla nutraĵo. Tiam ĝi estas vendata. Sed ĉe la vendo vidiĝis, ke ĝi ne estas sub, sed super la mezuro, kiun oni postulis. Pro tiu ĉi malzorgo la societo perdis sesdekmil kronojn.

Iu viro fondas bovfarmon por si mem k alaĉetas kvin bovinojn, sed en la unua jaro kvar el la bovinoj restis negravedaj, k oni diras, ke oni forgesis konduki ilin al la virbovo. Jen la viro k la bovinoj malaperas el la historio, ne parolante pri la bovidoj!

Skutull[1] bone scias, ke estas grava malĝentilo mencii ĉi tiun malĝojigan okazaĵon. Sed la respondo estas, ke *Skutull* ne estas burĝa, sed proleta, k tute malatentas, kion la burĝoj trovas ĝentila en tiu ĉi rilato.

Sed tion scias *Skutull,* ke tre mankas lakto en la urbo, tiom, ke iafoje al infanoj minacas malsano k al malsanulo morto pro tiu kialo. La publiko mem provas solvi ĉi tiujn malfacilojn per sia propra bovfarmo. Sed tiu savklopodo estas kalumniata ĉiel, k oni provas konvinki la publikon, ke la privata iniciativo estas ĉi tie pli taŭga. El sia proleta vidpunkto *Skutull* ne povas kompreni, kiel estas eble doni honestan respondon al tio, aliel ol menciante, kiel la privata entrepreno sin montras en tiu sama branĉo, k lasante simila esti simila.

Aŭ kion oni dirus pri nia farmkomitato k pri nia bonega ruĝa farmestro en Seljaland[2], se 16 el 20 bovinoj jam estus negravedaj en la unua farmjaro?

Tradukita el la islanda lingvo.

---

[1] *Skutull* estas organo de la laborista partio en Isafjordo.

[2] La komunuma bovfarmejo ĉe Isafjordo.

TRA ESPERANTIO

KIAL DEMIDJUK REVIZIIS?[1]

En antaŭaj artikoloj mi montris, ke jam ĉe la unuaj jaroj de la ekzisto de SAT ekzistis reviziemuloj, kontraŭ kiujn ni ĉiam devis batali. En tiu batalo helpis nin K-doj Demidjuk, Nekrasov, Futerfas, Hajdovski, Levandovski k. a. Kaj kio okazis? la tri lastaj K-doj estis sendataj por jaroj en malliberejon aŭ en ekzilon. K-do Demidjuk mem, en komenco de la jaro 1924, devis sidi dum tri semajnoj en malliberejo. Ĉe tiaj konstatoj mi mem forte konsilis al Demidjuk k Nekrasov, ke ili ĉesigu sian malkaŝan batalon kontraŭ la jamajn reviziulojn t. e. tiuj, kiuj volis, ke nia organizo estu tute ortodokse komunista.

Sendube multe da K-doj miros pro tiuj miaj diroj. Ili eble eĉ ne volos kredi, ke sufiĉas opozicii al la GPU-ano Drezen por esti sendata en malliberejon. Tiel tamen estas. Kaj nenia sincera aŭ ŝajnigita indigno de neantoj povas forigi la fakton.

Kredeble kelkiuj pensos, ke tiuj miaj diroj estas ia enmiksiĝo en la politiko de Komintern. Al tiu eventuala riproĉo mi volas antaŭrespondi. Estas bone konata fakto, ke en Sovetio multaj anarkistoj, socialistoj k komunistaj opoziciuloj sidas en malliberejo aŭ troviĝas en ekzilo. Mi ne perfidas sekreton, dirante tion. Ĉu tia politiko estas necesa por starigi la socialismon? Tio estas alia demando, kiun mi ne diskutos. Aliel estus ja fakte surpaŝi malpermesitan kampon. Mi tamen volonte konsentos, ke dum furiozas revoluciaj bataloj, la demokrataj principoj ne estas aplikeblaj. La klaso, kiu venkis dum la revolucio, devas nepre defendi siajn akiraĵojn kontraŭ la reatakoj de la venkita klaso. Mi tute konsentas al tio, ke la Sovetia Registaro devas defendi sin kontraŭ ĉiuj atakoj, kaŝaj aŭ malkaŝaj, de la reakciularo. Neniu pli ol mi malaprobas ĉian agadon, kiu povus ĝeni aŭ malhelpi la konstruadon de l' socialismo en Sovetio. Sed ĉiu saĝa homo bone komprenas, ke en tia longdaŭra batalo (ĝi ja daŭras de 13 jaroj) kontraŭ la malamikojn de l' socialismon konstruanta laboristaro, eraroj estas neeviteblaj. Ne ĉio estas el pura oro dum revoluciaj tempoj; nemalofte k neeviteble miksiĝas kun la ora entuziasmo por nobla celo la vulgara plumbo de l' egoismo k karierismo. Estas bone konata fakto, ke dum ĉiuj revoluciaj epokoj troviĝis ŝajnrevoluciuloj, kies ĉefa zorgo estis ĉiam aspekti ortodoksaj en la okuloj de l' pli fortaj. Tiauloj ne povas "morti kiel revoluciuloj", tial ke ili eĉ ne naskiĝis kiel tiaj. Kaj por kaŝi sian internan burĝecon, sian filistran vivmanieron, ili ĉiam estas pretaj denunci neortodoksulojn.

Mi havas la firman konvinkon, ke K-doj Futerfas, Hajdovski, Levandovski neniam endanĝerigis la Sovetian regadon; sed ili sendube estis parole neprudentaj, kuraĝis kritiki k ne ĉion admiri. Per tio ili liveris pretekstojn al ĉiama ortodoksa karieristo por denunci ilin kiel "kontraŭrevoluciulojn" k sendigi en malliberejon . . .

Dum sia trisemajna restado en malliberejo K-do Demidjuk povis bone pripensi k prijuĝi la situacion. Li decidis ĉesigi sian opozicion al SEU, k pli poste li eĉ fariĝis ĝia administra sekretario. Kaj dank' al tio, ke li estas saĝa k laborkapabla homo, kreskis,

---

[1] Vidu n-on 324 de "S-ulo".

Nova SAT-libro!

Ĵus aperis kiel volumo 12/13 de "Biblioteko de Sennaciulo"

Kristanismo kaj Patriotismo

de **L. N. Tolstoj.**

Traduko de I. Maĉernis.

Kun bildo de l' aŭtoro.

110 paĝoj. Form. 11×14 cm.

Prezo: 1.20 mk. g.

Mendu tuj ĉe Sidejo, 23 rue Boyer, Paris XX, aŭ Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

prosperis la entrepreno. Per lerta taktiko li eĉ povis dum kelkaj jaroj pli malpli sukcese atingi, ke SEU ne konkurencu al SAT, ke ĝi limigu sian agadkampon je la poresperanta laboro. Sed malgraŭ tio ĉiam ekzistis minaco al nia Asocio, fare de la ĝenerala sekretario de SEU. Se ni povis dum kelkaj jaroj prokrastigi la lastatempajn skismajn farojn, estis dank' al multaj klopodoj k senĉesaj zorgoj.

Neniu estas malpli surprizita ol mi pri la decidoj de l' CK de SEU, kiujn ni publikigis en la n-o 315 de "S-ulo". Mia nura miro estas, ke ili ne okazis pli frue...

Do, K-do Demidjuk aliĝis al la partio de l' reviziistoj. Nun lia voĉo miksiĝas en la ĥoro el tiuj, kiuj akuzas nin pri "oportunismo", "socialfaŝismo" k. a. similaj pekoj. Tia konstato estas sendube ĉagrena, sed ĝi ne vekas en mi grandan indignon. Mi eĉ deziras, ke K-do Demidjuk sukcesu tiom profunde revizii sian komprenon pri aferoj, ke li ne sentos eĉ plej etan konsciencriproĉon.

"Amasrevoluciano" li fariĝis k sekve tute logike nun aplikas la rimedojn, kiuj taŭgas por politika agitado. Mensogoj k aplombaj malveraĵoj estas nun liaj preferataj armiloj. Elekti aliajn li ja ne povas. Kiam motivoj mankas, oni uzas pretekstojn. Per sofismoj estas eble al lertulo konvinki "amasrevolucianojn", sed ne alispecajn...

Eble estas iluzio, sed mi kredas, ke la 10-jara eduklaboro de SAT ne estis tute vana; ke nun ekzistas en nia movado sufiĉe forta kerno el simplaj (neamas) revolucianoj, kapablaj pluigi la vivon de SAT, konservante ĝian ĉiaman karakteron — edukan, klerigan, kulturan. Se erare, nu, mi estos perdinta unu iluzion pli. Kaj kun la paso de l' jaroj oni kutimiĝas al tio...

Ĉu K-do Demidjuk tamen estis nepre devigata aserti, ke la diroj de la K-doj, kiuj nun ludas la rolon, kiun li mem ludis antaŭ jaroj, havas nenian valoron pro tio, ke ili estas "anonimaj"? Se jes, li estas kompatinda... Niaj informantoj estas malnovaj SAT-anoj, kelkaj eĉ estas kompartianoj k sekve iliaj informoj estas por ni same valoraj kiel la antaŭaj de K-do Demidjuk. Se tiuj informoj estus tiom senbazaj, oni ne povus klarigi al si, kial la ĝenerala sekretario de SEU tiom timas ilian disvastiĝon k pro tiu timo instigas al bojkotado de "S-ulo" k eĉ okazigas konfiskon de multaj ekzempleroj? Ni ne timas referendumon; ni ne timas kongreson en Moskvo; sed estas ĝuste la CK de SEU, kiu timas k pro tio faras ĉion eblan, por ke ne ekzistu tie en la esperanta movado *normalaj* kondiĉoj por tiuj aranĝoj...

K-do Demidjuk reviziis por ne trafi en malliberejon, por konservi sian postenon. Ne estante mem en similaj kondiĉoj kiel li, mi sekve havas nenian meriton, restante fidela al la ĝisnuna SAT. Kiel mi batalis kun li kontraŭ la reviziemo, same mi batalos sen li por gardi SAT-on tia, kia ĝi ĉiam estis...

Ĉi tio povus esti la finiĝo de mia parolo. Tamen, proksiman semajnon, mi eble pritraktos kelkajn flankajn, sed samtemajn punktojn. Ne por konvinki K-don Demidjuk, sed por helpi al inteligentaj k honestaj homoj, ke ili havu ĝustan komprenon pri la situacio en nia movado. *E. L.*

Korektoj. En n-o 323 bonv. legi sur pĝ. 82, lasta kolono, 5-a linio de malsupre: *eldiris* (anst. prononcis); en p. 86, 3-a kol., lin. 36 de supre, *taksi* anst. "taski".

Faktoj senmaskigas la mistifikon

K-do Demidjuk en artikolo aperinta en n-o 304 de "S-ulo", sur pĝ. 490 k 491, provis klarigi la nepresigon de SAT-verkoj en Moskvo per la fakto, ke ekzistas tie kelkaj teknikaj malfacilaĵoj. Forpasis 5 monatoj, de kiam tiu artikolo aperis. Malgraŭ nia instrukcio de 25. 6. 30, ke oni presu tie per la ŝuldata mono *ion ajn laŭ sia elekto*[1] — neniu SAT-verko aperis.

Dume aperis je la nomo de EKRELO **kvin** verkoj

Cent tridek tri tagoj	142 paĝoj
Ruĝa Talko (Pestun)	21 „
Rublov-Zirkel	62 „
Preparantoj de Milito	72 „
Poemoj (Majakovski)	72 „

Ni lasu al la Legantaro la zorgon fari komentojn pri tiuj faktoj. Ni ne dubas, ke pripensemaj homoj finfine akiros kiel ni la firman konvinkon, ke la reteno de la mono de SAT en Moskvo estas unu el la atutoj en la malnobla ludo de CK de SEU kontraŭ nian Asocion.

TRA LA MOVADO

KRONIKO

JUGOSLAVIO. K-do 8335 sciigas, ke preskaŭ ĉiuj n-oj de "S-ulo" ne atingis lin pro konfisko, lastatempe li estis alvokata al la policestro, kiu al li diris, ke "S-ulo" estas malpermesita por Jugoslavio. — *NEDERLANDO.* Jam dum pli ol 2 monatoj la Feder. de Lab. Esp-istoj ricevis la permeson ĉiudimanĉe paroladi antaŭ la mikrofono (en Hilversum) k verŝajne ni povos daŭrigi la elsendojn i. a. por kursoj. Ni ĉiam propagandis por SAT k ĝiaj organoj. La 21. decembro okazis esp. parolado de K-do Klatil ĉe tiu stacio (Hilversum, ondlongo 298 m) en kadro de la Radio-unuiĝo VARA (lab. radioamatoroj), je 8.45 ĝis 9 horo laŭ MET. Aŭskultintoj sendu raporteton al VARA, Postbus 50, *Hilversum* (Hol.). — *SOVETIO. Odeso.* Odesa Radiocentro disaŭdigas (ondo 450 m) je 3., 5., 8., 13., 15., 18., 23., 25. k 28. de ĉiu monato esp. kurson de 19.40 ĝis 20 h. laŭ MET. Aŭskultantoj raportu al Radiocentro, *Odeso*, Lenina str. 17, por "Esp. Radio-Bulteno". — *SVEDIO. Kiruna.* La loka konsilantaro de l' Lab. Kleriga Asocio venigis lektoron Seppik por gvidi kursojn dum sept./okt. La instruado okazis kun 150 p., inter ili ĉ. 30 geinstruistoj. Krome aparta kurso por 80 infanoj el popola lernejo. Je 26. okt. okazis ekzameno en popoldomo antaŭ 800 p. En nov. komenciĝis daŭriga kurso kun 185 p., kiun gvidas instruisto Otterfors; krome okazas en la popollernejo infankurso (gvidas instruistino Öst). Nun estas proks. 300 esp-istoj ĉi-loke.

[1] Tion ni skribis por forigi ĉian ajn pretekston pri nepresiĝo.

Tre taŭga informilo dokumentoriĉa k nepre leginda estas la

PLENA
VORTARO DE ESPERANTO

Volumo de 536 pĝ. en formato 14×20 cm.
Prezo: bindita ekzemplero 10 mk. g. afrankite
broŝurita „ 9 „ „ „
Nur por aktivaj membroj (t. e. membro-abonantoj) de SAT validas rabato de 20 % je tiu ĉi verko.
Mendu ĉe Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 aŭ Direkcio de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX

Ricevinte ĉi tiun leteron, ni komunikis ĝin al K-do v. d. Heid, k publikigas ĝin kun la konsento de la koncernato. Red.

"*Berlin,* 1. dec. 1930. Kamaradoj! La estraro de GLEA decidis, sendi al vi jenan proteston, pro la presigo de la artikolo de v. d. Heid en lasta n-o de "S-ulo". Bonvolu presigi ĝin en "S-ulo", ĉar la artikolo de K-do v. d. Heid estas erariga en sia enhavo k ofenda en sia formo:

La estraro de GLEA opinias necese kontraŭ la tendencan k erarigan artikolon en n-o 321 "Skisma malsano" per jena ĝustigo.

1. Ankoraŭ nun en GLEA kunlaboras kamerade socialdemokratoj k komunistoj. Socialdemokrataj funkciuloj eĉ forte k pozetive subtenas la estraron en sia laboro. 2. La GLEA-estraro informadas siajn funkciulojn k membrojn periode pri la membrostato de la organizo. Estis ĝuste K-do v. d. Heid, kiu persone proponis al K-do Vildebrand en Londono, ne aperigi en "A. E." la nombron de eksiĝintaj membroj. En novembra n-o de "Arbeiter-Esperantist" estis indikitaj precizaj ciferoj pri la membrostato en GLEA, kiu eĉ montras kreskon kompare al la stato antaŭ la lasta GLEA-konkreso. 3. La raportoj de la distriktoj estas aŭtentikaj de la distriktestroj k laŭkutime aperigitaj en la oficiala organo de GLEA. 4. Kontraŭ K-don v. d. Heid, kiu nun vekrias, estis proponita la eksigo. Antaŭ ol la estraro povis esplori la fundamentecon de tiuj akuzoj, v. d. Heid preferis fuĝi el la vicoj de GLEA. Estas lia persona ĉagreniĝo, kiu vidigas lin "kompletan skismon" en GLEA. 5. La komunistoj en GLEA ne "atingis okupi la ĉefajn postenojn" nur nun, sed jam de pli ol 6 jaroj havas gvidajn funkciojn. Regula plimulto en la kongreso k konferencoj *elektis* ilin pro ilia serioza laboro. 6. K-doj Bässler k Richter, vizitinte delegacie minskan laboristan k kamparanan kolektivojn, pasis Moskvon k partoprenis kiel gastoj tute ordinaran konferencon de amika al GLEA-SEU-estraro. Ili havis nenian oficialan komision de nia organizo.

La estraro de GLEA.
Komisie: Kurt Wiebach."

KOMENTO

Ĉi antaŭan "ĝustigon" la redakcio legigis min k necesas ĝustigi ankaŭ miaflanke la "ĝustigon" jene:

1. La pro la GLEA-konflikto fondita SEA (Socialista Esperanto-Asocio) jam komence de novembro nombris pli ol 600 membrojn. Pluraj el GLEA eksiĝintaj K-doj ne aliĝis al SEA. Certe ekzistas esceptoj, ke socialdemokrataj K-doj "ankoraŭ" pozitive subtenas la estraron en sia laboro, sed kiom?

2. Vere mi proponis en London al K-do Vildebrand ne citi nombron de eksiĝintoj. Mi ankaŭ diris al li la kialon, nome, ke la publikigo de tiom malmultnombraj grupanarciferoj ne estas propagandiga al neesperantistoj. Pri grandnombraj eksiĝoj el GLEA ĝis nun neniom estis legebla. (Intertempe ja eksiĝis grandaj grupoj laŭ demokrata voĉdonsistemo, sed oni ne raportas pri tio.)

3. Mi ĉeestis du distriktajn konferencojn, pri kiuj aperis unuflankaj raportoj, kompreneble sub respondeco de la (komunistaj) distriktestroj.

4. Mi "fuĝis" el GLEA, ĉar intertempe mi konvinkiĝis, ke la partitendenca gvidado de la estro k redaktoro ne ŝanĝiĝos (laŭ propraj eldiroj de K-do Vildebrand en Lajpciga eksterordinara kunveno). Se la skismo por la GLEA-gvidantoj ne jam estas sufiĉe kompleta, ili sendube zorgos, ke tiu stato tre baldaŭ faktos. (Vidu sub punkto 1!)

5. Vere 6 jarojn la estreco de GLEA estis en komunistaj manoj (sen redakcio); sed post la ŝanĝo de la estro k enkonduko de la nova "klara linio" per alia pli juna k nova K-do (Vildebrand), foriĝis la antaŭa kontentiga interharmonio. La "elekton" bone preparis la komfrakcia antaŭlaboro.

6. Ĉu estas eble "pasi" Moskvon, se oni veturas el Lajpcig al Minsk? Laŭ mia scio la malo ĝustas. Ĉu mi asertis, ke K-doj Besler k Rihter veturis al Moskvo laŭ komisio de GLEA? Mi ripetas, ke K-doj Besler k Rihter veturis "plezure" al Moskvo, dum en Londono ilia frakcio pene klopodis forpeli la SAT-direkcion! Kiu volas, tiu komprenu!

A. v. d. Heid, Dortmund.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Se grenereto... de *Kenelm Robinson,* Londono 1930. Ĉefdeponejo: Heroldo de Esperanto, Köln. Formato 14×19; 160 pĝ. Prezo 6 mk g.

Jen estas nova libro, kiu plaĉos per sia bela aspekto k per sia bonega presigo: en la tuta verko mi ekvidis nur tri aŭ kvar preserarojn; sed ĝi plaĉos ankaŭ precipe per sia interesa enhavo.

Se grenereto ... konsistas el filozofiaj aŭ, pli ĝuste, el pedagogiaj rakontoj, en kiuj K. R. priskribas la morojn de la junaj anglaj lernantoj. En la novelo titolita *La fremda knabo,* kiu ampleksas 78 paĝojn, estas admirinde pentrita la vivado de la pensionantoj en Anglujo. Kvankam nepruda realisto, la aŭtoro dece evitas la maldecaĵojn. Eĉ en la *Paganta Gasto* la mistera kartona skatoleto (p. 15) ne ŝokos ĉastajn K-dinojn, ĉar ili ne komprenos.

Kvankam K. R. mirinde posedas k regas la lingvon, li ne apartenas al la skolo de tiuj stilistoj, kiuj nepre volas montri sian majstrecon per tio, ke ili ĵonglas k akrobatas per la frazoj je la kosto de la klareco. Da strangaj parolturnoj mi renkontis nur malmulte en la libro; ekz.: "la afero *jenas* (p. 46): oficon, en kiu li havos tempon studi, *edzi, patri* (94); Turner estis *sedonta* (146) (sedi = kontraŭdiri, diri *sed*); lernejo *gea* (lernejo por knaboj k knabinoj kune)." Aliaj esprimoj ŝajnis al mi iom tro koncizaj: "mi memoras *pri kiam* (39) (pri la tempo kiam); mia influo sur vin, *se ia* (69) (se ia ekzistas); *pri kial* (87) (pri tio, kial); ankaŭ vi portos, kiam pastro (97) (ankaŭ vi tion portos, kiam vi estos pastro)"; tio estas anglaĵoj k jena frazo kontraŭe estas pure franca: "sed subite li konstatis ke li *iras ofendi* Claran (138)"; aliparte anstataŭ: "ne tenu la manojn en la *poŝojn* (138)" k "la admiro de la aliaj knaboj estas senvalora, eĉ enuas (130)", mi dirus *poŝoj,* kun la nominativo, k *enuigas.*

K. R. volonte k prave uzas la verban adjektivon en loko de la participo: *falsa, malferma, interesa, influa, konvinka,* k ankaŭ la nombran substantivon *deko, dekduo,* en la nepreciza senco franca de *dizaine, douzaine:* "el la dekduo da pensionantoj; konsistanta el deko da pensionantoj (71)". Li same k sentime uzas la sufikson *end* k la prepozicion *sen* antaŭ l' infinitivo: *sen havi, sen konscii, sen esti;* li eĉ uzas la konjunkcian esprimon *sen ke:* "sen ke iu malhelpu lin (140)".

Mi notis kelkajn novajn vortojn pli malpli taŭgajn; iuj rilatas al la futbala (piedpilko) ludo: *golo, goli, dribli, forŭardo, laŭno, pafi* (tre rapide kuri). *eksterhafo, kradisto,* k jenaj, kvankam ili ne estas oficialaj, certe ne estas ĉiuj forĵetindaj: *morna, erota, aprezi, patrumi, etoso* (?), *frekventi, iriti, limeriko, eseo, kverelo, parcelo, bebo, broka* (brokaj libroj. 77), *kviki* (87), *stumbli, heĝo, darfi, piedumi, pisi, tofeo* (116) (karamelo), *kakaĵo, masturbi, superumi, rivali, koito, vortumi, evento.*

Resume la verko de K. R. meritas okupi bonan lokon en ĉies biblioteko.

H. B.

NIA POŜTO

6732. — Tempo mankas al K-do L. por verki tian artikolon. Via artik. en venonta n-o. Pro nesufiĉa afranko de via let. pagu al Adm. 0,30 mk. g.

5418. — Pri "Se mi estus" vd. noton en "N. P." de n-o 322. Sekve tiu artik. ne aperos.

10 634. — En jan. "L. L." aperos iu el viaj verkaĵoj; la kanto "Vivu S." ne estas presmatura (vers-arte); ni posedas multajn versaĵojn pli taŭgajn, k eĉ el ili nur parto povos aperi pro spacomanko. *Red*

14 013. — La teksto de anoncoj kun kadro estas ĉiam sendata al Parizo, pro tio la prokrasto.

8569. — Por membroj la nekrologo estas senkosta. *Adm.*

KORESPONDADO

AŬSTRIO

K-dino J. Stainacher, Peter Turner Str. 21, *Leoben,* kĉl, L, PI.

BULGARIO

K-do Filip Hristov (lernanto), Derĵavno Muzikalna Akademia, *Sofia,* kĉl, pri ĉ. temoj.

DANIO

— Mi dez. koresp. kun ĵurnalisto aŭ kun s-ro aŭ fraŭlino, kiu interesiĝas pri vojaĝoj. Adr.: Jens A. B. Jacobsen, Balslev Prastegaard pr. Eiby St. Fyn., *Odense.*

GERMANIO

— Kelkaj membroj de GEA koresp. pri interesaj temoj kĉl. Adr.: H. Wobst, Wormser Str. 59, *Dresden-A. 19.*

— *Mi sendas al vi* artajn ksilografaĵojn (manpresaĵojn). *Sendu* al mi ĉiajn PM, pref. valorajn. Tujan resp. gar.: K-do Oskar Walter, *Kleinschönau/Sa.,* Nr. 21.

HISPANIO

K-do Gabino Martinez, Primavera 5 duplicado, *Madrid,* kun socialistoj k komunistoj sovetiaj, PI.

NEDERLANDO

K-dino Trompettes (fraŭlino), Prezident Brandtstr. 71/II, *Amsterdam.*

POLIO

K-do Josefo Steĉ, Aleja Wojska Polskiego n-o 29, lĝ. 56, *Warszawa-Zoliborz,* kĉl, MP.

SOVETIO

K-do Petro Poliŝĉuk, Krasnoarmejskaja 84/5, *Kiev,* Ukrainio, kĉl.

K-do M. T. Taramikin, Vodoprovodnij per. 17, kv. 1, *Moskvo-17,* kĉl, pri ĉ. temoj, PI.

Volonte mi pagos por sovetia K-do 6-monatan aŭ jar-abonon al "S-ulo", se li mem petos tion al mi. Mia adreso: *Coll J.,* Hôtel Lesdiguières, Cours J. Jaurès 198, *Grenoble,* Francio. (SAT-ano 7998.)

La 6-an de decembro mortis subite, 31-jara, nia fervora K-do

MAX WETZEL

SAT-ano 1745

Ni perdis kun li karan kamaradon k fervoran esperantiston, al kiu ni gardos ĉiam bonan memoron.

Laborista Esp. Grupo "Frateco", Glauchau/Sa.

ENHAVO

	pago
Senlabora — Aĉetu pomojn!	97—98
Frederiko Engels	98—99
Kristnaska festo por proletoj	99
Por ni mem	99
La klasbatalo tra la mondo	99—100
Laborista Internaciismo — Laborista Sennaciismo	100—101
Vojaĝimpresoj de K-do Perer	100
Por aŭ kontraŭ Sovetio	101
El Islando	101—102
Tra Esperanto	102—104
Korespondado	104

Abontarifo al Sennaciulo: Argentino, pes. 6; Aŭstrio, ŝil. 12; Belgio, belgoj 12; Brazilio, milrejs. 18; Britio, ŝil. 9; Bulgario, lev. 250; Ĉeĥoslovakio, kr. 60; Danio, kr. 10; Estonio, kr. 8; Finnlando, mk. 80; Francio, fr. 40; Germanio, mk. 9; Hungario peng. 10; Italio, lir. 45; Japanio, jen. 5; Jugoslavio, din. 120; Latvio, lat. 10; Litovio, lid. 20; Nederlando, guld. 6; Norvegio, kr. 9; Polio, zlot. 15; Portugalio, esk. 40; Rumanio, lej. 350; Sovetio, rubl. 4,50; Svedio, kr. 9; Svisio, fr. 12; Usono dol. 2,50. — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon. MONON ONI SENDU: rekte al la Administranto de SAT, Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio), poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per ŝtataj monbiletoj en registrita letero aŭ per poŝtmandato.

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)